

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

EL NIA MUZEO

Simbolmarko fiksita!

Ni fiksas la simbolmarkon de Esperanto-Muzeo Jokohama, kiel montrite. Estis kelkaj kandidatoj, kaj helpite de la opinioj aperintaj en la retlisto de niaj membroj, la Teamo por la Muzeo elektis, kaj la estraro agnoskis tion.

La simbolo estas bazita de mapo-signo por muzeo, modele de grekstila halo, kun stelo. Nia muzeo ne estas granda kaj el ligno, tamen sentu nian entuziasmon!

Esperanto-Muzeo



Prezentita okaze de la 70a Esperanta Kongreso en Kantoo

En la 12a kaj 13a de junio okazis la kongreso de la distrikto Kantoo, kiu inkluzivas Jokohamon, Tokion kaj najbarajn guberniojn. Ĝi okazis ĉeeste en Tokio sed ankaŭ interrete per la sistemo Zoom. Kadre de tio, unu el la fakkunsidoj ja temis pri tiu ĉi muzeo, kaj de 15:30 ĝis 16:15 en la 13a tago, deko da partoprenantoj (pardonon, mi ne nombris) povis scii pri nia Muzeo. Nome komence kaj fine de la fakkunsida horo okazis “rondrigardo” de la muzeo, de la ekstero, unua etaĝo, ŝtuparo, dua etaĝo. Dume okazis demandoj kaj respondoj, fare de Sibayama Zyun’iti.



Niaj klasoj

***Esoj:** gvidas Doi Hirokaz, en Muzeo, en sabato de 13:00 ĝis 17:00

Oni finlegis la ĉapitron “Kongresa enigmo aŭ enigman kongreson” el “Tamen ĝi moviĝas”. Lastatempe oni legas infanlibron “Knabo en marso”, tradukitan el la vaska lingvo, kaj japanigas la tekston.

***Teksantoj:** gvidas Doi Ĉieko, per Zoom, en lundo de 16:00 ĝis 17:00

Nun unu kursano. Oni legas fikciajn rakontojn el “Stranga kato”, de Vasilij Eroŝenko.

***eriko:** gvidas Doi Ĉieko, en Muzeo, en merkredo de 14:00-16:00

Ne okazis en majo pro la okula operacio de la gvidanto.

***Jokohama Salono** (same kiel en aprilo): sen gvidanto, per Zoom, en sabato 15:00-17:00


Principe la 1-an kaj la 3-an sabatojn de monato oni legas “La Ŝtona Urbo” – komencita en aprilo 2019, oni legis ĝis p.250 en la fino de majo, de la libro 350-paĝa. La 2-an sabaton oni prezentas sian liberan frazfaradon, kaj la 4-an sabaton oni interkritikas sian tradukaĵon el materialo libere elektita.

Eseo


Homoj kiujn mi renkontis en mia matena promenado

Aida Yayoi

Kiam mi renkontis lin en la ripozejo li estis manĝanta matenmanĝon sur la ligna benko rigardante la insulon Enoŝima flosantan sur la maro. “Bonan matenon!” Mi salutis lin. “Kiel estis Enoŝima hodiaŭ? Ĉu homoj iom plimultiĝis pro ferioj?” Li kutime ekiras frumatene per biciklo de sia hejmo en Kamakura por veni la insulon Enoŝima kaj tie li rondiris de loko al loko. Post la mallonga biciklado li forlasis la insulon kaj venis ĉi tien. Kun afabla rideto li respondis, “Jes, pli ol kutime sufiĉe da homoj turismis tie kaj la atmosfero estis vigla. Inter junuloj iuj estis babilantaj laŭte, iuj dormantaj marborde, iuj starante manĝis antaŭ vendobudoj.” Li menciis amuze, verŝajne rememoris lian junecon, kvankam laŭ mia supozo li estas ankoraŭ apenaŭ mezaĝa. Kien li biciklos de nun? Pri tio mi ne demandis, ĉar nia rilato ne estis tiel intima. Li manĝis panon feliĉeme, kaj dume mi ĝuis la lumojn flagri laŭvice ĉe la fora malsupro de la insulo ĝis la longa ponto.



Tiu irana viro, alta kaj bela mezaĝulo, jam retiriĝis el alia internacia projekto, kvankam pri kio li ne menciis konkrete, la frapo de KOVIM-19



sendube severe afliktis lin. Jam ĉian esperon li perdis. Mi aŭskultis liajn vortojn kun kompatato. Li ne dormis tutan nokton kaj ekveturis ĉi tien per motorbiklo antaŭ matena krepusko. “Fronte al la maro mi nun krios malbenon kontraŭ Ĉinio” dirante tion li adiaŭis min.

Li estas malalta, naŭdektrijara viro, matene promenas malrapide, mallonge. Lamentante pri sia korpo, lia rideto ne reflektas malĝojon. Li laboris ekde la sepa jaro helpante hejmon. “Nuntempe tio kontraŭus homajn rajtojn, ĉu ne?” Li ridas gaje.

Mi renkontis irananon iumatene en nia kutima ripozejo ĉe la marbordo Kocubo. Mi unuafoje renkontis lin kaj tio estos la lasta, ĉar li venis senpripense el iom malproksima urbo Jamato, pro impulso forigi sian maltrankvilon. Li volis malbenigi Ĉinion laŭtvoĉe al la maro, ĉar laŭ li Ĉinio propagis koronaviruson. Lia projekto startigi fiŝ-kompanion en Irano komune kun japana enterpreno venis al subita interrompo. Laŭ li spadofiŝoj (*kaĵiki*) estas bone kaptitaj en Irano. Kiam la projekto komenciĝis kun granda espero, KOVIM-19 eksplodis tutmonde kaj elimalpermeso inter landoj deklariĝis.



s-ino Aida Yayoi ĉe la marbordo Kocubo en Urbo Zuŝi

JOKOHAMO PLI NOVA (1)

En 2017, ni eldonis “Gvidlibro pri Jokohamo, kun Eseoj Hamalogiaj, 2017”. Jen pasis kelkaj jaroj, kaj ni prezentos kelkajn novajn aspektojn.

Nova Urbodomo de Jokohamo

La antaŭa urbodomo (p.75 de la Gvidlibro) estis konstruita en 1959, fariĝis tro malvasta por urbo kun 3 kaj duonmiliono da loĝantoj, kaj tial pli ol 20 branĉaj oficejoj ĉirkaŭ la ĉefa oficejo estis necesaj.

La nova oficejo unulokigis ĉiujn oficejajn funkciojn, kaj ekfunkciis en 2020, rekte konektita de la subfervoja stacio “Bashamichi”. Ĝi estas 155 metrojn alta, kun 32 etaĝoj kaj 2 subteraj etaĝoj.


(SZ)



Forpasis s-ro Jamasaki Motohiro, mia antaŭulo

(1943-2021)

Sibayama Zyun'iti



En la 17a de januaro 2021, la oficejo de JEI ricevis rete manuskripton de la Krucvorta Enigmo, aperonta en la aprila n-ro de “La Revuo Orienta”, de s-ro Jamasaki Motohiro, sub la nomo de

KLERa+Jamo. Fine de januaro, ni sendis al li presprovaĵon de la enigmo por la marta numero, tamen sen respondo – tion ni ne sentis grava; tia afero okazas al ĉiu de tempo al tempo. En la 2a de marto, ni sendis al li presprovaĵon de la aprila n-ro, kaj tamen la retletero ne atingis la adresiton, ĉar tia retadreso ne ekzistis.

En la 4a de marto, do mi telefonis al li, loĝanta en Nagano. Tiam lia edzino ricevis la vokon, kaj kiam mi nomis min “Sibayama, rilate al Esperanto”, ŝi malkaŝis, ke s-ro Jamasaki forpasis en la 20a de januaro, kaj trovita en la 24a. Ŝajne estis ia komplika afero dum la tagoj, sed mi ne plu kuraĝis detale demandi. En la lastaj jaroj, mi kaj mia edzino, ricevinte manuskripton de la Krucvorta Enigmo, iom dubis pri lia demenca stato, ĉar ekzemple, ŝlosiloj de la krucvorto estis foje strangaj, foje malĝustaj, kio ne troviĝis en la ĝisnunaj 8 jaroj da manuskripto-sendado.

Cetere, en la nomo, Jamo estas li mem, sed kio estas KLERa? Ĝi estas karesnomo de lia

komputilo, en kiu estas lia memkodita programo por fari la krucvortan skemon, kun vortaro de Esperanto. La ŝlosilajn frazojn li mem elpensis.

Nu, mi komencis mian esperantistan karieron, enirinte en Kaŭauĉi Esperanto-Klubo^(*) (KEK) en 1968, en kiu Kaŭauĉi estas la nomo de la tereno de la Ĝeneralaj Kursoj, nome por ĉiuj 1-gradaj kaj 2-gradaj studentoj de Universitato Tohoku. Tiam ofte vizitis nian kluboĉambron s-ro Jamasaki, tiama studento en la magistriga kurso de la scienca fakultato. Li estas ĉ. 6 jarojn pli aĝa ol mi. Gvidite de li, mi partoprenis ankaŭ en urbanan rondon Sendai Esperanto-Societo. Post universitato mi loĝis jen en Kansai, jen en Jokohamo – dume, s-ro Jamasaki komencis karieron de matematikisto (precipe en la kampo de statistiko), unue en Universitato Tohoku, kaj poste en Universitato Ŝinŝu en la urbo Nagano. Tie li, post emeriteco ankoraŭ loĝadis.

Mi kaj li estis en la stabo por kompili la Esperanto-Japanan Vortaron, eldonitan en 2006. Tiam inter la stabanoj estis multaj (eks-)Sendaianoj. Krom li kaj mi, s-ro Gotoo Hitosi kaj s-ro Matumoto Takasi.


Cetere, antaŭ ol s-ro Saka Tadasi, s-ro Jamasaki kelkajn jarojn zorgis paĝojn por Frazfarado sur RO. Li estis kelkajn jarojn ĉefdelegito de UEA (kiun funkcion poste faris s-ro Doi Hirokaz por kelkaj jaroj).

(*) 川内エスペラント会

Trezoro de Muzeo

mimeografita "Orienta Azio"

De 1911 ĝis 1915, en la lultempo de japana Esperanto-movado, aperis de Tokio mimeografita esperanto-gazeto "Orienta Azio", eldonita de Harada Jubi. La foto montras n-ron 28 en 1914, kaj aliaj n-roj estas en la Muzeo. La gazeto inkluzivas prezenton de la japana kulturo, tradukon el japanaĵoj, ktp. Sed eĉ enigma hodiaŭ estas la belaj "kolorigitaj" paĝoj, ne nur kovrile, sed ankaŭ interne.



el Slovakio

En televido mi vidis interesan dokumenton pri "holokaŭsto" kiu nomiĝas "Kofro de Hanna". En Tokio estas Centro pri Holokaŭsto. Ties ĉefino volas paroli kaj montri al gelernantoj milithororojn. Ŝi ricevis el Auschwitz (Osviencim) kofron de knabino Hanna. Kaj la Centro preparis ekspozicion. Hanna estis ĉeĥa juda orfino kiu kun sia frato troviĝis en koncentrejo. Ŝi mortis. Ŝia frato ne. Li vivas en Kanado kaj vizitis Tokion. Li diskutis kaj donacis familiajn fotojn. Eble vi scias pri tio. Por mi tio estas ege interesa, ke en Azio oni interesiĝas pri eŭropa historio. via Jana Rambousková

el Pollando

Letero kaj donaco de pola amiko

S-ro Jerzy DRYJA el la urbo Legionowo (apud Varsovio), Pollando sendis jenan gratulan leteron, kaj donacis al ni librojn, i.a. pollingvan lernolibron reage al nia multjara projekto "Nia Unua Lernolibro de la lingvo".

Mi gratulas kaj bondeziras vin pro la malfermo de la Esperanto-Muzeo Jokohama. Mi vizitis vian ilustritan retpaĝon, kiun mi trovas interesa. Mi esperas, ke via muzeo bone servos al la uzantoj de Esperanto kaj al la loka socio, prezentante diversflankajn valorojn de la Lingvo Internacia. Mia lernolibro por unuagradanoj pri la pola lingvo, sendita al vi kiel kontribuajo por via ekspozicio, jam atingis Japanion.

Kun elkoraj salutoj kaj bondeziroj
Jerzy DRYJA [jeĵi drija] esperante
Georgo La urbo Legionowo [legjonovo] apud Varsovio, Pollando

eĥoj tutmondaj

el Koreio

Koran dankon kaj gratulon je la malfermo de Esperanto-Muzeo Jokohamo.

Certe la muzeo kontribuos brile por nia movado.

Ĉiaman sanon kaj sukceson.
LEE Jungkee

